

La Espero

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

EL LA ENHAVO

Radio 78

Mia unua prediko 79

San Francisco 80

Kalmar 81

Librolisto 84/85

Tradiciaj kredo kaj lingvo
en Rumanio 86

Abono 20 sv. kr.


Poŝtĝiro: SEF 20 12-3

6

1972

60-a jaro

KALMAR



La ponto de Öland, 6.070 metrojn longa, estas la plej longa ponto de Eŭropo. Partoprenantoj en la jarkongreso de SEF 1973 povos ĝin rigardi.

La artikolo "Bela Revo?" de blaen numero 5 de La Espero evidente vekis intereson, ĉar pluraj legantoj telefonis aŭ skribis al ni pri ĝi.

Kaj la temo, la stato de la esperanta literaturo, estas ja vere tre aktuala. Per tio ni ne volas aserti, ke la situacio hodiaŭ estas speciale kriza; dum la lastaj jaroj aperis tamen multaj belaj kaj valoraj verkoj. Eĉ nia sveda eldonejo, kiu nun devas uzi grandan parton de sia kapitalo por nova granda vortaro, aperigis nun laste "Tralandoj de indianoj". (Ĉu vi aĉetis ĝin?) Sed bla-prave konstatas, ke la eldonkvantoj estas tro malgrandaj kaj ke la eldonaĵoj tro longe restas nevenditaj en la stokoj de la eldonejoj. Sekve de tio kaj pro la konstante kreskantaj preskostoj, la eldonejoj baraktas kun grandaj financaj problemoj.

Tiu situacio eĉ ne estas aparta por nia literaturo. La granda tagjurnalo Dagens Nyheter dediĉis sian gvidartikolon la 29.11 1972 al la problemoj de la sveda literaturo, kiuj grandparte estas similaj almenaŭ koncerne la altkvalitajn literaturaĵojn. DN ankaŭ konstatas ke la prezoj de svedlingvaj libroj ĝenerale estas pli altaj ol tiuj de ekz. anĝlingvaj, sed diras ke tio estas neevitebla sekvo de pli malgrandaj eldonkvantoj. Tiuj kiuj plendas pri la prezoj de la esperantaj libroj, tamen relative moderaĵ pripensu ke aĉetante esperantolibron oni faras servon al nia movado, des pli ĉar niaj eldonejoj ĝenerale laboras sen profito.

Ĉar bla-mencias pri la enhavoriĉa librolisto de UEA kaj timas, ke multaj homoj ne estas tiel aktivaj, ke ili mem mendas librojn de UEA, nia eldonejo atentigas, ke ĉiuj libroj estas mendeblaj pere de Eldona Societo en Malmö. Ili volonte helpas al vi.

La fakto restas tamen, ke la stato de nia literaturo, kiu estas nepre vivkondiĉo por la tuta esperantomovado, ne estas kontentiga. Al vi kiel individuo mi diras. Mendu tuj novan libron! Sed ĉar ni homoj ĝenerale estas iom inertaj estas grave, ke ni en la kluboj pli atentu pri tiu afero, instigante la membrojn aĉeti esperantajn librojn. Tio estas vere grava kampo de nia agado!

A. Blomberg

Numero 6. 60-a jaro
NOV.-DEC. 1972

Utsändningar på Esperanto från europeiska radiostationer (Svensk tid)

För närvarande pågår utsändningar på esperanto förutom i Europa även i USA, Brasilien och Kina, men vi har här tagit med enbart sådana stationer, som det bör finnas möjlighet avlyssna i Skandinavien.

Dagliga utsändningar från Polens Radio, Warszawa

Kl. 06.00—06.30 på våglängderna: 41,18 — 48,90 — 50,04 m.
Kl. 16.30—17.00 på våglängderna: 31,01 — 31,45 — 41,99 m.

Måndagar

Kl. 00.30—00.55 Sofia 31,38 och 49,42 m.
Kl. 13.20—13.30 Bern 13,94 — 16,86 — 19,44 — 19,60 — 31,46 och 48,66 m.

Onsdagar

Kl. 13.20—13.30 Bern (lika måndag).
Kl. 14.00—14.15 Wien 203 m. (Endast var fjärde onsdag — så det gäller att söka den rätta.)
Kl. 21.45—22.00 Sabadell (Spanien) 203 m.

Torsdagar

Kl. 22.45—22.55 Bern 19,44 — 19,60 — 25,28 — 25,60 — 31,46 — 48,66 och 75,28 m.

Fredagar

Kl. 00.05—00.20 Zagreb 264 m.

Lördagar

Kl. 00.40—00.50 Gdansk 230 — 278 — 1322 m. (Varannan lördag.)
Kl. 13.30—13.40 Gdansk Repris på kortvågen 25 — 31 — 41 — 48 och 49 m.
Kl. 22.45—22.55 Bern (lika torsdag).

Söndagar

Kl. 21.00—21.20 Rom 25,42 — 30,90 och 41,24 m.
Kl. 21.05—21.30 Sofia 50,62 m.
Kl. 23.45—24.00 Valencia 358 m.

*

Stationerna är glada för lyssnarbrev och här får Du en del användbara adresser:

- Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, Warszawa, Polen.
- Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, I-00100 Roma, Italien.
- Radio Sofia, Bulgarien.
- La Voz de Levante, Valencia, Spanien.
- Svisa Radio, SOC, Ch-3000 Bern 16, Schweiz.
- Radio Wien, Esperanto, Argentinierstr. 30 a, A-1041 Wien, Österrike.
- Radio EAJ 20, Sabadell, Spanien.
- Radio Zagreb, Jugoslavien.
- Pola Radio, Esperanto, ul. Uphagena 1, Gdansk-Wrzeszcz, Polen.

RES TILL BELGRAD

och sedan till Aten eller Split

Kongressresan 1973 går till Belgrad i Jugoslavien, där Esperantovärldskongressen äger rum 28 juli—4 augusti. Den skandinaviska resan går från Köpenhamn den 27 juli. Ledare Gust. Kühlmann, Köpenhamn. Färden företages med flyg Köpenhamn—Belgrad med SAS.

Efter världskongressen ytterligare en veckas uppehåll i sydliga länder. Denna gång kan man välja mellan antingen en vecka i Aten, eller en vecka i Split (Jugoslavien). Flygresan Belgrad—Aten—Köpenhamn och Belgrad—Split—Köpenhamn.

Båda efterkongress-alternativen betingar samma pris.

Skriv till Jan Strönne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö, så skickar vi ytterligare upplysningar om resan. Det är lämpligt, att den som har för avsikt följa med till Belgrad redan nu anmäler sitt intresse.

Glöm ej anmäla Er till själva kongressen. Se sista sidan. En av anmälningsperioderna går ut den 31 dec.

SEF

MIA UNUA PREDIKO

K. - O. Sandgren

Unu printempon, unu-du jarojn antaŭ ol Panjo tondis miajn harbuklojn, mi ricevis puŝbiciklon, kiu tiutempe estis tre moderna ludilo. Estante el la privilegiita klaso (ĉar mia patro estis pastro), mi estis la sola knabo posedanta tian modernan kaj rapidegan veturilon en la vilaĝo kaj kompreneble mi ne kaŝis mian privilegion sed veturaĉis tien-reen tra la mirigitaj aroj da infanoj. Nu — ĉar estis ja nur malgranda vilaĝo, la aroj estis nur unu aro, kaj mi kiel pastrido ne havis multajn okazojn por ŝteliri al ĝiaj kunsidoj. Sed tamen mi provis montri mian superecon, kiam ajn estis eble.

Al la pli granda vojo mi ne kuraĝis veturi, ĉar tie venis bruegante la motorbicikloj, levante nubojn el polvo malantaŭ si. Mi ankoraŭ ne konatigis al iu tia fantoma motorsinjoro. La bienoj, kie loĝis la tiam edziĝmaturaj knabinoj sin trovis en alia vilaĝo, kaj tien rapidegis la motorbicikloj, ne haltante interne de mia malgranda horizonto por ebligi vidi ilin.

Ĉar mi tiam ankoraŭ ne ekkonis la altiran forton inter la seksoj, mi tute ne povis kompreni, kial la sinjoroj ne volas almenaŭ unufoje halti apud mi. Sed mi ankau sciis bone, ke mi tiuokaze fuĝus malantaŭ arbustoj, ĉar ili certe estas malbonaj homoj, tiuj sinjoroj motorbiciklantoj.

Neniu venanta en la preĝejon de mia patro ja havis motorbiciklon. Tiuj nur ĝenis la kunvenojn, farante friponaĵojn ekster la domo en la mallumaj vesperoj, donante plenajn gasojn al siaj motoroj, bremsante kaj startante, kaj la preĝantaj piulinoj sur la krudaj benkoj ekstremadis sub siaj malhelaj kaptukoj.

Certe tiuj motorfiuloj estas aŭ socialistoj aŭ pentekostanoj, mi pensis, eble ambaŭ, ĉar mi aŭdis, ke tiuj estas fiaj sed krom tio mi nenion sciis pri ili. Tamen pri unu viro mi sciis, ke li estas pentekostano. Do, mi rigardegis al li ĉiam tre atente de malantaŭ la dorso de Patro aŭ Panjo, kiam ni hazarde renkontis lin. Mi min demandas nun, ĉu Patro aŭ Panjo sentis, kiel mi tremas malantaŭ iliaj dorsoj. Eble ili mem tro multe tremis por senti la tremon de knaba maneto.

Nu — mi restadis sur la vilaĝa vojeto kun mia puŝveturilo. La tero tie estis plata kaj bona, speciale ĉe la pinarbareto, kie kuŝis amaso da pingloj sur la vojo, moligante ĝin. Tie mi ĉiam startis mian veturegon, farante poste duoncirklan enveturon en nian domkorton. Unu tagon la kokinoj kaj la koko estis lasitaj pikadi vermojn kaj sablerojn en la ĝardeno, kiam mi envenis rapidege tra la krad-

K. O. Sandgren estas la energia sekretario de KELI, Kristana Esperantista Ligo Internacia. Sed ni fakte ne sciis pli frue ke li estas ankau bona novelisto. Ĉi tiu rakonto estas preskaŭ modela por novelo en gazeto kiel la nia: simpla, benhumora, tamen pensiga kaj respegulanta profundan komprenon pri la vanteco kaj malforteco de la homoj.

LA REDAKCIO

deziras al ĉiuj legantoj

**AGRABLAJN
FESTOTAGOJN
kaj**

**FELICAN NOVAN
JARON.**

Manuskriptoj por la venonta numero atingu nin plej malfrue la 5-an de januaro 1973.

pordo. Senpripense sed eble iom superece mi alcelis la kokinaron per mia kondukilo kaj flugigis ĝin ĉiudirekten. Ili ekblekis plej terure, timigitaj ĝis ekstremo pro mia furioza alveno. Mi kompreneble ĝuis.

Sed venis jen kun ruĝigitaj okuloj la koko, kiu estis promeninta iom for kun sia portaga amatino. Kaj nun komencis batalado plej sanga. Ja — eble ni diru: fuĝo — miaflanke. La koko estis kolera, ne unufoje, je mi. Li saltis, haketis, flugetis ĉirkaŭ mi, farante akrajn kriojn. Mi fine savis min en la lignostabelojn, kie mi enŝlosis min por duonhora. Duonhora estas preskaŭ eterneco por knabeto, tamen ĝi ne sufiĉis por igi al la koko tute forgesi min.

De post tiu tago la koko malamis min ĝis morto. Li atakis ĉiufoje, kiam li vidis min, eĉ se mi estis en la alia flanko de la ĝardeno, li alkuris. Mi ja minacis kruele al lia haremo! — Tio daŭris longe — ĝis mi alprenis pastran oficon por la kokinaro!

Estis lundon post speciale verva kaj spirita dimanĉo. Tre laŭtvoca kaj dramaĉa vojaĝanta pastro estis vizitinta la ŝafaron de mia patro kaj mi estis forte impresita. Mi sciis, ke jam dum la dimanĉo mi ne povus malfermi mian novan praktikon, ĉar oni ne rajtas fari ion amuzan dum tiu tago, sed lunde — jen vidos la kokinoj ion! Kaj la koko, tiu perdita animo, li vere aŭdos la evangelion tiel ke li nepre savigos jam la unuan fojon!

Mi rigardadis mian novan ŝafaron tra la fenestro. Ili aspektas ja ĉarmaj

kaj piaj en sia korto, sed estas ja dimanĉo kaj ankau fiuloj devas montri ian respekton, speciale pro siaj mastroj.

Lunde mi do frue havigis specialan permeson ellasi la gekokojn en la ĝardenon, kie mi starigis mian katedron (keston). Estis pli inde tie kolekti la ŝafaron ol en ilia propra kota hejmo. Vere, kredanto — mi aŭdis — devus esti en la mondo, sed oni ne rekte diris, ke la kokejo estas la mondo.

La koko alvenis tuj furiozante. Mi surgrimpis la keston provante neglekti liajn haketojn al miaj kruroj. Plej digne krazaŭ mi havus grandan stomakon mi starigis, aŭdigante (post hm. hm) mian plej pian voĉon:

— Karaj gefratoj! Ni estas kolektiĝintaj en ĉi tiu loko hodiaŭ por disservi. En la nomo de la Patro ĉiela mi salutas vin bonvenaj. Nian kunvenon, super kiun ni preĝas la benon kaj ĉeston de Dio, ni komencu per kanto numero tridek-unu, tri-dek-unu. La kokinoj pikadis grenerojn ĉirkaŭe, ĉar tiajn mi dissemis por sekurigi grandnombran ĉeston. Kaj eĉ la koko estis fininta ataki min ĉar li kredis, ke mi ne volas inciti lin. Nun li rigardis min de malantaŭ trunko, ĉar li ne tute fidis min, ne sciis kio sekvos, eĉ ne kiel sonas la kanto tridek-unu.

Dum la "komuna" kantado mi agis orgenisto, ĉar kiam la koko lasis min, mi kuraĝis grimpi alteren. La kesto estis orgeno. Mi piedfrapis la teron ritme, kvazaŭ mi pumpus aeron en la orgenon. Delikate kaj kun graciaj movoj mi ludas sur la kesto. Sed samtempe mi agas kantisto. Laŭte mi kantadas.

Starigante denove sur la podion, post elirigo de tia pia sed memkontenta elspiro (ankaŭ el la granda stomako) mi faras tre tre bonsonan preĝon pri la alesto de Dio kaj Lia Spirito. Nature mi ankau ne forgesas la gefratojn malsanajn kaj tiujn, kiuj pro "aliaj kaŭzoj" ne povis veni al la disservo. Mi ja tre bone scias kion oni devas diri.

Tuj post la preĝo mi ŝajngas turni min al eminenta gasto, dirante:

— Nun mi diras nian koran bonvenon al vi, kara frato Terbruo. Estu Dio en vi, ke parolu la puran evangelion hodiaŭ al ni ĉiuj, en la koron de ĉiu aparte. Dio benu vin!

Mi (kun la granda stomako) fratece manfrapas la ŝultron de la pli juna pastro Terbruo.

Nun venos la prediko. Pastro Terbruo (mi) saltete starigas malantaŭ la kesto. Mi (li) devis stari tiel por povi manfrapi la keston dum la prediko! Estas nun io speciala en la atmosfero. Ĉu la Spirito, mi pensas (li scias, ke estas).

La kokinoj ĉesigas sian pikadon momente, balancante siajn kapojn flanken, precize kiel la virinoj en la vera preĝejo. Mi imagas, ke ili ankau jam purigis siajn okulvitrojn per la

PRENUMERERA

FÖR 1973 PA

ESPERANTO-TIDNINGAR

Heroldo	30:—
Kontakto	15:—
Kvinpinto	4:50
Kvinpinto stödjande	8:50
Oomoto	13:—
Sennaciulo	26:—

Ingen moms på dessa priser. UEA:s tidskrift "Esperanto" får man genom medlemskap i UEA och "La Espero" genom Svenska Esperanto-Förbundet.

Förlaget förmedlar abonnemang även på andra Esperanto-tidningar men kan inte ta ansvar för att dessa levereras.

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7

Postgiro 578-5

Postkongreso en San Francisco

Kiam oni intencas fari vojaĝon en malproksima lando, oni serĉas informojn pri vojaĝeblecoj diversloke. Kelkfoje oni ricevas la plej gravajn informojn ne de la vojaĝoficejoj sed de personoj, kiuj havas proprajn spertojn pri la koncerna lando. Tio okazis al mi, kaj tial mi deziras antaŭ ĉio informi vin pri vojaĝebleco, kiu estas nekonata de specialistoj pri vojaĝoj kaj en Usono kaj en Svedujo. Mia konsilo estas — se vi vizitos multajn lokojn dum mallonga tempo — aĉetu en Svedujo flugbileton nomitan "Visit the USA!"! Ĝi kosta cent kvindek dolarojn kaj validas en la tuta lando dum dudek tagoj por flugado tage kaj nokte, se vi volas tiom flugi. Kiam mi, dank' al bileto post vizito de parencoj, UEA-delegitoj kaj vidindaĵoj en diversaj partoj de la granda lando, fine alvenis al Portland, mi tie ree renkontis multajn usonajn gesamideanojn kaj partoprenis enhavriĉan kongresprogramon, pri kiu vi jam multe legis.

Frumatene la tagon post la solena fermo granda parto de la postkongresanoj ekveturis aŭtobuse al la Statkolegio de Humboldt en Arcata, kie ni tranoktis survoje al la Statkolegio de San Francisco, kie okazis la postkongreso. Survoje ni havis du interesajn spertojn: Ni sentis la dezertan varmegon kaj ni pasis tra la Aleo de la Gigantoj. La gigantoj estas la du specoj de sekvojaarboj, kiuj laŭdire povas fariĝi pli ol cent metrojn altaj, ok metrojn dikaj kaj pli ol kvar mil jarojn agaj. Ili estas vere imponaj. Kiel efemera estas la homa vivo kompare al la vivo de la gigantaj arboj! Se ili povus rakonti!

La postkongresa programo estis tre interesa kaj instrua. Marde ni studis la indianojn, merkrede la hispanlingvanojn, jaŭde la negrojn, vendrede la japanojn kaj sabate la ĉinan kvartalon, kie ni havis ĉinan bankedon.

Sendube la plej impona estis la esperanton parolanta indianino, s-ino Roan Orloff-Stone, kiu prezentis la Navajo-tribon kun propra religio, lingvo kaj tradicio. Junaj indianoj montris siajn dancojn — kaj belegajn teksaĵojn. Infanoj de integra lernejo en San Mateo prezentis artan programon, kiun gvidis s-ino Doris Vallon. La japanoj montris teceremonion kaj ĉinaj studentoj drakdancon. — Cu vi scias, ke la japanoj dum la dua mondmilito estis en usonaj koncentrejoj? Kaj ke la ĉinoj estas la malplej krimaj ŝtatoj de Usono?

De la kolegio ni posttagmeze ekskursis al muzeoj kaj parkoj en la tre dekliva urbo. I. a. ni vidis la Operon, kie eminentuloj subskribis la doku-

mentojn de Unuigintaj Nacioj en 1945. La orgeno kaj la lustroj de la nova katolika preĝejo estas neforgeseblaj. Io eksterordinara estis la moderna koncerto, kie la muzikistoj uzis novkonstruitajn instrumentojn.

Merkrede vespere la postkongresanoj estis invititaj al diversaj usonaj hejmoj, kie ni estis akceptataj kiel gastoj de la familioj. Ni rigardis la tutan domon kaj ricevis abundan manĝaĵon. Estis tre agrabla kunestado. Revenante en privataj aŭtoj ni vidis la bele lumigitan marbordon ĉe San Francisco.

Tro rapide malaperis la semajno, kaj dimanĉe ni kolektiĝis al la ferma lunĉo en Claremont Hotel, bele lokita en Berkeley. Koran dankon al ĉiuj organizantoj! Kaj ĝis revido en Beograd!

Aŭto al la flughaveno de Los Angeles je 20.05 per DC 8 Torgny Viking, super Grenlando al Kopenhago je 14.35 post 10 horoj kaj duona en la aero. Distanco 9.300 km. Alteco 11.300 m. Ekstera temperaturo — 50°. Rapideco 900 km pohore.

El Lo.

AŬTUNA KONFERENCIO DE SVEDA SEKCIO DE KELI

Vespere la 13-an de oktobro kolektiĝis membroj de la Sveda sekcio de KELI en Götabro Missionsskola, Kumla, por la aŭtuna konferenco. Prelegis direktoro Paul Rimmerfors, SIDA, pri la evoluantaj landoj kaj montris interesajn kolorbildojn. Ceestis la svedlingvan prelegon ankaŭ multaj lernantoj. Ĉiuj ricevis la enhavriĉan broŝuron "Samarbete för utveckling", ricevebla senpage de SIDA, 105 25 Stockholm.

Sabate Ingall Droby kaj Ragnhild Niklasson enkondukis la temon "Vera riĉeco en la nuna mondaĝo". Poste sekvis gruplaboro. Okazis komuna ekskurso al la preĝostonoj en Torp kaj al la ruino de Riseberga.

Vespere parolis Birgitta Ahlén pri la situacio de la junularo. Wilhelm Dahlén raportis pri la Keli-kongreso en Le Rocheton, Hildur Pettersson kaj Olle Olsson pri Portland. Britta Rehm rakontis pri vojaĝo al Sydney kaj montris belajn kolorbildojn.

Dimanĉe David Kullberg raportis pri la konferenco en Frostavallen kaj aŭdigis sonbendon. Anna Alamo-Sandgren laŭtlegis historian rakonton pri Torp. Ĉe la diservo predikis Karin Persson. Ni diligente uzis la novan kantlibron Adoru Kantante.

La printempa konferenco okazos en Vrigstad.

El Lo.

naztuko por povi vidi bone la belan (tiel diris Panjo) pastron Terbruo.

Foliumante ABC-libron (kiu cetere estis ornamita de granda koko) la pastro trovas la tekston kaj "legas" parkere:

— Kaj kiel Dio kolektas siajn kokidojn sub sian pelton, tiel vi koko (malhela voĉo) devas kolekti viajn kokinojn. Amen.

La diservo nun subite kaj abrupte finiĝis, ĉar la tento envenis tra la kradpordo en formo de Onklino la Vendistino, kiu ĉiam kunportis bombonojn por mi. Mi kuris renkonte, faris ĉion decan kaj indan por kiel eble plej rapide akiri la kutiman bombonaron kaj poste forkuris malantaŭ heĝon por mem ĝui ĉion en sekreto por ke Panjo nenion rimarku. Alie ŝi certe forprenus preskaŭ ĉion kaj ĝin kaŝus al mi, donante nur unu aĉan bomboneton ĉiutage.

Kaj nun, kiam ŝi fine vokis min por tagmanĝi, mi pro ia stranga kaŭzo ne havis emon manĝi. Mi ploretante iris al la fenestro. Sur la korto la gekokoj trankvile manĝadis, tute ignorante kion ili travivis en tiu tago. Ili vivadis plu en sia mondo kaj mi en mia, kaj neniam plu renkontiĝis la du.

Sed eble oni povas rimarki ian efikon de la evangelio: La koko fakte fariĝis iomete pli bona. Bedaŭrinde — por esti tre verdira, oni ne povas doni la saman ateston pri la predikisto. Tia estas la sorto de kelkaj aŭskultintoj, tia estas ankaŭ la sorto de kelkaj predikistoj.

Kaj tial mia unua prediko ankaŭ fariĝis mia lasta.

KALMAR LOGAS VIN!



La silueto de la kastelo de Kalmar estas tipa por la epoko de la reĝa dinastio Vasa.

Partoprenante esperanto-kongreson oni volas ankaŭ pli malpli turisti. Rigardi la kongresurbon, konatiĝi al ĝi kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Kalmar, la loko por la ĵarkongreso de SEF en 1973, situas iomete flanke de la ĉefvojoj kaj tial eble nur malmultaj mez- kaj okcident-svedoj ĝin vizitis kaj vidis.

Tamen ĉiujare pli ol kvarcent mil turistoj pasigas semajnon aŭ pli en la insulo Öland kaj tiam trapasas Kalmar, rigardante la kastelon, la katedralon kaj aliajn malnovajn konstruaĵojn.

Pri la aĝo de la urbo Kalmar neniu scias, sed jam dum la vikinga tempo la haveno estis vaste konata. Troviĝas dokumento, laŭdire en Lübeck, el la mezo de la 13-a jarcento, kiu portas la sigelon kaj la blazonon de Kalmar. Ĉar ĉi tiu blazono samaspektas al la hodiaŭa ĝi verŝajne estas la plej malnova urboblazono de Skandinavio.

Vere historia interesa kaj eĉ ĉarmeta estas la urbo. La kastelo estis jam en la 12-a jarcento defendkonstruaĵo kun turoj kaj remparoj. Dum la paso de la jarcentoj ĝi estis alkonstruita kaj pli-grandigita, ĝis kiam en la 16-a jarcento la reĝo Gustav Vasa kaj liaj filoj ankoraŭ plivastigis kaj plibeligis ĝin, doninte al ĝi la aspekton kiun ĝi hodiaŭ havas.

Multaj bataloj okazis pri tiu kastelo, kaj la proksimaj loĝejkvartaloj estis ofte atakataj kaj difektataj de la malamikoj. Kiam okazis akcidento en 1647 kaj la urbo kun ĝiaj lignodomoj forbrulis, la aŭtoritatuloj tial decidis, ke oni translokigu la urbon al la insulo Kvarnholmen (Mueleja insulo) pli longe for de la danĝera najbareco de la kastelo kaj tie konstruu nur ŝtondomojn. Pro malriĉeco la enloĝantoj tamen ne kapablis konstrui domojn el

ŝtono, kaj la konstruaĵoj estas tial ĉefe el ligno.

Sekve, la urbocentro hodiaŭ situas tie kie oni dum kvindek jaroj konstruadis la novan urbon kaj kun ĝi fortikajn remparojn, kiuj grandparte ankoraŭ restas, speciale ĉe la havena flanko kun la impona pordego Kavalerjeren (La Kavaliro), tra kiu fluas la trafiko de la Granda Placo al la haveno.

Ĉe la Granda Placo (Stortorget) situas la tre impona katedralo, desegnita de la fama arĥitekto Tessin (la maljuna) kaj inaŭgurita en la jaro 1682. La katedralo devenas de la ĉefpreĝejo de la bruligita urbo. Tiun preĝejon la svedoj mem krevigis por ke la danoj ne povu ĝin uzi por el ĝi pafi al la kastelo.

La urbo konstante kreskas. Hodiaŭ ĝi havas 56.000 da enloĝantoj. Ĉiam sin establas novaj industrioj. Lasta-

tempe la konata aŭtokompanio Volvo komencis konstrui grandan fabrikon tuj apud la tute nova aŭtostrado. Je tiu komenciĝas la vojo, kiu kondukas orienten al la insulo Öland trans la novan pontegon, kiu, 6.070 metrojn longa, estas la plej granda ponto de Eŭropo. La libera alteco por ŝipoj estas 36 metrojn. Ĝi estas konstruita el betono kaj havas 154 kolonojn. La kost estis proksimume 70 milionojn da kronoj. Dum la konstruado specialistoj el okdeko la landoj alvenis por pristudi ĝin. La oficiala gvidanto spertis gravajn lingvaj malfacilaĵojn, kaj je iu enketo li rakontis, ke ekzemple la angla parolata de japanoj estis por il preskaŭ nekomprenebla.

La ponton solene inaŭguris la kronprinco Carl Gustaf la 30-an de septembro 1972, kaj dum la unuaj semajnoj pli ol tricent mil da aŭtoj utiligis la imponan konstruaĵon.

La turista oficejo de Kalmar eldonis antaŭ du jaroj broŝuron pri la urbo en naŭ lingvoj, inter kiuj ankaŭ estas esperanto. En ĝi oni bone rakontas pri malnovaj kaj novaj vidindaĵoj de la urbo. Kun detala urboplano ĝi kostas 5: — kronojn kaj estas mendebla ĉe Turista Oficejo, Ölandshamnen, 381 00 Kalmar.

Pro aktiva politiko kaj progresemo kaj pro ankoraŭ pli firma reputacio kiel kultura urbo Kalmar estis proklamita "Urbo de la jaro" en 1970.

Ni vigle esperas, ke la esperantistoj, en Svedujo kaj en niaj najbaraj landoj, amase partoprenos la 67-an ĵarkongreson de la Sveda Esperanto-Federacio dum la pentekosto 1973, samtempe kaptante la okazon rigardi nian historian urbon kaj partopreni ekskurson trans la grandan novan ponton al la longa insulo de Öland. Niki

KALMAR ATENTIGAS:

Ĉiuj kiuj veturos per la ŝtataj Fervojoj al la SEF-kongreso dum pentekosto 1973 ricevos rabaton je 25 % de la bilet-kostoj.

Glumarkoj kongresaj kostas 1: — kronon po folio de dek markoj. Haveblaj de

**Esperanto-Kongreso,
J. Wik,
Jupitervägen 8,
381 00 Kalmar**

Poŝtĝirokonto 86 00 73-6.

POLITIKISTOJ DECIDOS PRI ESPERANTO

La socialdemokrata partio kongresis en oktobro ĉijare. Kiel jam multajn fojojn antaŭe, unu el la mocioj al tiu kongreso temis pri esperanto. Kiel jam okazis antaŭe, oni malakceptis la mocion. Oni fakte malakceptis ĝin jam pli frue, ĉar ĝi venis al la kongreso sen la subteno de iu loka socialdemokrata organizo.

La kaŭzo, kial mi mencias tiun mocion ne estas la mocio mem, sed la negativa respondo al ĝi. Iu en la estraro de la stokholmaj socialdemokratoj krude konstata, ke "la dominanta lingvo — la angla — estas uzata hodiaŭ kune kun, antaŭ ĉio, la hispana kaj franca en internaciaj organizaĵoj. La angla estas parto de la elementlerneja instruado ek de la kvara jaro kaj estas prijuĝata kiel la plej grava fremda lingvo el edukvidpunkto, kaj ke ĝi donas la plej grandajn eblecojn por komuniki kun ne-svedparolantoj. Malgraŭ la grandaj avantaĝoj, kiujn esperanto kunportus, ĉar ĝi, laŭ la vortoj de la mocianto, estas logika kaj facile lernebla, la decida faktoro, kial esperanto ne fariĝis internacia lingvo dependas de la fakto, ke ĝi ne estas parolata kiel ĉefa lingvo de la popolo de iu lando." (Ne kulpigu min pro la lingvaĵo citita. Mi nur tradukis ĝin.)

Se mi bone komprenas, la respondanto diras, ke esperanto ne "fariĝis" internacia lingvo — ĉar ĝi ne estas nacia lingvo! Tio estas kompreneble sensecaĵo, sed kompreneble ekzistas iom da vero en tio.

Supozu, ke esperanto estas la lingvo parolata en Usono. Ĉu vi povas diveni, kiu estus la unua fremda lingvo en la svedaj lernejoj? Ĝi nomiĝus esperanto. Kaj oni elektus ĝin ne pro la meritoj, kiujn ni trovas en esperanto — logikeco, facileco, neŭtraleco — sed malgraŭ tiuj meritoj. Se ekzistus iu ekonomia aŭ politika forto malantaŭ esperanto, ekzistus ankaŭ sufiĉe da politikistoj kaj lingvistoj kiuj volus havi ĝin.

Kial mi mencias tiun mocion? Unue, ĉar ĝi estas malbona. Ĝi postulas de politikistoj, kiuj tute ne estas informitaj pri la argumentoj por esperanto, surbaze de sia nescio esprimi starpunkton. Ĝi logike estos negativa. Ĝi estas krome malbona, ĉar ĝi donas al ili la eblecon rifuzi esperanton per kialoj, kiuj estas ŝajne objektivaj: malgrandeco de la lingvo. Kaj trie, mi prenas ĝin kiel ekzemplon, ke jam sur loka nivelo oni decidis por aŭ kontraŭ iu mocio, kiel en tiu-ĉi kazo. Se la laborista komunumo de Stockholm estus akceptinta tiun mocion, tiam okazus diskuto pri ĝi en la kongreso. En ĉi kazo mi supozas, ke ĝi estis tute preteratentita. La mociinto ja ne partoprenis en la kongreso.

Mi ripetas: jam sur loka nivelo oni decidis por aŭ kontraŭ io.

Jam sur loka nivelo ni devos agi, se ni entute volas, ke esperanto iam estu akceptita de politikistoj. Ĉar fine estos politikistoj, kiuj decidis por ĝi — kontraŭ ĝi ili jam ofte decidis.

Ni esperantistoj devas esti realistaj. Kiam ni proponas ion, ni proponu ion, kion oni ne povas rifuzi. Ni proponu etajn ŝanĝojn, provojn pri taŭgeco de esperanto, antaŭ ol ni proponas ĝeneralan akcepton de esperanto. Ni scias, ke esperanto taŭgas, sed la politikistoj volas havi pruvojn, oficialajn pruvojn, antaŭ ol ili decidis pri io. Tiaj hodiaŭ apenaŭ ekzistas. Ili apenaŭ ekzistas, ĉar politikistoj ne volas decidi pri ili. Ni troviĝas en ia diabla cirklo, kiun ni iel devos rompi.

La vojo rompi tiun cirkolon nomiĝas informado.

Politikistoj ne estas la sola grava grupo. Ni devas informi ankaŭ lingvistojn, ĵurnalistojn, junajn homojn.

Ni havas kompreneble intereson informi ĉiujn homojn. Tio ne eblas, ni scias tion. Pro tio ni devos elekti la grupojn, al kiuj informi. Ni havas ankaŭ intereson varbi pliajn membrojn. Sed kion ni varbas, kiajn argumentojn ni uzu? Ĉu argumentojn pri amikeco trans limoj, vojaĝeblecoj, korespondado — aŭ argumentojn pri lingva neegaleco, pri kultura diskriminacio de malgrandaj popoloj?

Per diversaj argumentoj ni altiras diversajn homojn. Ni devas konscii pri tio. Se ni volas varbi membrojn, kiuj ne nur uzas la lingvon por propra amuzo, sed kiuj povos plue varbi novajn membrojn, la argumentoj pri diskriminacio kaj neegaleco pli taŭgas. Tio estas ankaŭ la argumentoj, kiuj, laŭ mi, estas pli akcepteblaj ankaŭ al politikistoj. Ĉar, finfine, ja estas la politikistoj kiuj decidis pri esperanto.

Franko Luin

HELSINGÖR

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos denove en 1973 (22—29 de julio) en La Internacia Altlernejo de Helsingör. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj pasigi neforgeseblajn tagojn en internacia rondo. Programo estas senpage havebla ĉe

L. FRIIS

Ingemannsvej 9

DK-8230 Abyhøj, Danlando

LAKSHMISWAR SINHA: LA ESPERANTOMOVADO EN HINDUJO

En 1963 mi verkis kaj eldonis sesdek kvar paĝan historion de "la tutmonda esperanto movado" en la bengala lingvo. Mi sendis ekzemplerojn de tiu libro al profesoroj, verkistoj kaj aliaj profesiuloj en West Bengal. Mi ankaŭ ricevis multajn respondojn, kiuj estis ege variaj kaj interesaj. Iu fama juristo kaj verkisto respondis ke li lernis esperanton jam en 1905, kiam li ankoraŭ estis en lernejo, sed poste li ne plu sekvis la esperantan movadon. Alia fama lingvisto kaj profesoro de universitato skribis ke li "multe interesigas pri esperanto" kaj deziris, ke mi daŭrigu la movadon en Bengalujo.

En 1959 s-ro Tibor Sekelj kiel ambasadoro de UEA traveturis la hindan kontinenton. Li vizitis ankaŭ Nepalon kaj Cejlonon. S-ro Sekelj instruis esperanton al Aĉarja Vinoba Bhave, la fama disĉiplo de Mahatma Gandhi kaj socia reformanto. Poste alvenis s-ro Miljoviĉ kiu gvidis kurson en Nepalo kaj ankaŭ vizitis mian hejmmregionon Santiniketan kaj aliajn lokojn kaj parolis pri esperanto al neesperantista publiko.

Fakte esperanto eniris Hindujojn jam dum la brita regado, ĉar anglaj oficiroj enkondukis la lingvon en 1905. Poste en 1926 d-ro Poŝko el Litovio vizitis Hindujojn. Li gvidis kurson por anoj de YMCA en Calcutta. Li restis kelkajn monatojn en Santiniketan kaj parolis pri esperanto al d-ro Rabindranath Tagore. Lia lernanto s-ro Pravat Ghosh tradukis la dramon "Poŝt-oficejo" de Tagore el la bengala lingvo. Laŭdire tiu traduko iam aperis en la fama "Literatura Mondo" kaj la manuskripto ankoraŭ troviĝas en la Tagore-muzeo en Santiniketan.

Mi mem esperantigis en Svedlando en decembro 1928, en Stokholmo, kaj de tiu tempo mi verkis plurajn librojn; la plej lasta estas "Jaroj sur tero" eldonita de Eldona Societo Esperanto en Malmö. Post mia reveno al Hindujo mi dum la lastaj kvardek jaroj daŭre instruis esperanton al multaj hindoj. Tamen nur en 1963 mia lerninto Abani Halder kaj mi sukcesis fondi la Bengalajn Esperanto-Instituton kaj starigi bibliotekon. S-ro Halder instruas esperanton konstante ek de tiu jaro. Li vizitis la landojn de Eŭropo kaj spertis la utilon de esperanto en la internacia vivo. Li estas nun ardanta esperantisto. Nuntempe li vivas en suda Hindujo en Gandhigvam. En Delhi s-ro Seoti Prakash kun helpo de s-ino Haudebine starigis la Hindan Instituton de Esperanto. Bedaŭrinde s-ro Prakash antaŭ nelonge tragedie mortis provinte savi dronantan virinon en la rivero Gango. Lia forpaso es-

tas granda perdo por la hinda movado. Li havis ideojn kaj vigle laboris por esperanto. Espereble la Hinda Instituto de Esperanto daŭrigos la movadon.

Mi maljunigis kaj tial donacis la bibliotekon (ĉirkaŭ kvin cent esperantolibrojn de Bengala Esperanto Instituto) al la Hinda Nacia Biblioteko en Calcutta, kie juna esperantisto, s-ro Prabal Das Gupta, vigle laboras por esperanto. Li ofte verkas artikolojn pri esperanto kaj ankaŭ ĝin instruas.

Mi aparte mi esperantigis multajn junulojn, kaj inter ili estas miaj du filoj Animesh kaj Nihiles, kiuj ĵus nun studas en Svedujo respektive Japanujo (vidu La Esperon nro 5/1972). Mi esperas, ke ili ambaŭ spertos la utilon de esperanto kaj fariĝos veraj esperantistoj.

Jen do mallonga historio de la esperantomovado en Hindujo. Mi venis al la konkludo, ke la plej multaj junaj hindoj kiuj lernis kaj lernas esperanton ne havas kontaktojn kun la tutmonda movado pro la cirkonstancoj en la hinda subkontinento. Tio estas bedaŭrinda afero. En Japanujo la Oomoto-movado vigle kaj konstante laboras por esperanto kaj por frateco inter la homaro. Ni esperu, ke Oomoto estonte sukcesos helpi ankaŭ al la esperantomovado en aliaj landoj de Azio. Cetere multaj hindoj kaj aliaj azianoj studas en Eŭropo, Ameriko, Kanado, Aŭstralio kaj Nov-Zelando. La esperantistoj de tiuj landoj eble povas, se oni deziras, kontakti kaj interesigi la hindajn lernantojn en siaj landoj. Ni — ĉiuj esperantistoj — semu kaj semadu konstante informojn pri la lingvo por internacia interkompreno kaj frateco de la homaro.

Lakshmiswar Sinha
Vinaya Palli
P. O. Santiniketan
West Bengal
Hindujo

ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO

Kiel vi eble jam scias nova eldono de la Enciklopedio estas planita. Sub aŭspicioj de CED laboras la ĉefredaktoro Ulrich Lins, Köln, kaj diverslandaj kunhelpantoj. La verkon eldonos J. Regulo Perez, Tenerifo.

Mi promesis kunlabori pri la svedaj partoj, sed kompreneble mi bezonas la helpon de kiel eble plej multaj gesamideanoj.

Mi jam sendis cirkulerojn al diversaj personoj, sed alvenis nur unu respondo.

Mi petas vin pripensi, ĉu vi scias pri personoj aŭ aferoj kiujn vi opinias menciindaj en la Enciklopedio, aŭ ĉu informoj en la malnova eldono devos esti kompletigitaj. Anticipe dankas pro ĉies helpo!

Runo Stridell, Hagstigen 6, 590 30 Borensberg, tel. 0141-409 87.

Ou du vill ha en årsbok med

- adresser till delegater och fackdelegater i hela världen
- boklista med alla esperantoböcker som kan köpas
- esperantoförbund i andra länder
- tidskrifter
- våglängder för radiosändningar på esperanto

Om du regelbundet vill läsa i Revuo Esperanto om

- viktiga händelser i esperantovärlden
- recensioner
- artiklar av ledande esperantister i olika länder
- småannonser

Då ska Du bli medlem i UEA Sänd 43,- till postgiro 14 74 29-5

43,— kr till postgiro 14 74 29-5, Svenska Esperantoförbundet, Specialkonto. Skriv MA på talongen.

Du kan också få rabatt, eller betala stödjande avgift, i följande kategorier (förutom MA ovan):

- **JMA 32,25 kr**
Ungdomsmedlem under 22 år med årsbok, tidning Esperanto och tidning Kontakto
- **MAK 43,— kr**
Ungdomsmedlem 22—25 år med årsbok, tidning Esperanto och tidning Kontakto
- **JMJ 10,75 kr**
Ungdomsmedlem under 22 år med endast årsbok
- **MJ 21,50 kr**
Medlem med endast årsbok
- **MS 64,25 kr**
Stödjande medlem, med årsbok och tidning Esperanto
- **DM 860,— kr**
"Dumviva medlem", betalar 20 MA-avgifter och är sedan ständig UEA-medlem

Svenska Esperantoförbundet

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fack

200 42 Malmö 7

Postgirokonton 578-5

BOKLISTA 1973 över av förlaget utgiven skönlitteratur m.m.

EKSPEDICIO KON-TIKI

Världskänd reseskildring av Thor Heyerdahl, översatt från norska av C. Brynhildsen. 210 sid.

Boken skildrar ett av vår tids största äventyr, den långa och farofyllda färden på flotte över Söderhavet, vilket sex modiga män under författarens ledning genomförde för att bevisa teorin att polynesernas förfäder en gång utvandrat från Sydamerika. Heyerdahls berättartalang kommer snabbt läsaren att känna sig som medlem på den gungande flottan under dess riskabla färd över oceanen. Vackert linneband med guldtryck. Rikt illustrerad med foton ur originalupplagan.

Pris inbunden kr. 25: —

JAROJ SUR TERO

Originalverk av Laksmiswar Sinha, känd indisk Esperantoveteran. 128 sid.

L. Sinha berättar i sin självbiografi om sin barndom och ungdom i Indien, då ännu nästan orört av europeisk kultur, om sina intressanta studieår i Sverige och sin kontakt med Esperanto där, och slutligen om sitt liv som vuxen i hemlandet under de stora förändringarnas tid. L. Sinha förenar i sig Indiens gamla rika kultur och moderna impulser från Europatiden, och hans bok är en värdefull återblick på ett långt och innehållsrikt liv. Illustrerad med foton ur författarens familjeliv m. m.

Pris inbunden kr. 16: —, häftad kr. 12: —

MALSATA ŜTONO

Bengaliska berättelser av Rabindranath Tagore, översatta från bengaliska språket av Laksmiswar Sinha. 128 sid.

I sju berättelser förs läsaren in i indisk atmosfär, ömsom sagolik och fantastisk, drömlig och beslöjad, ömsom hårt realistisk med pressande klimat och strängt arbete som huvudbeståndsdel i den indiska lantbefolkningens dagliga liv. Översättningen är gjord av den indiske Esperantoveteranen och Sverigevännen L. Sinha. Boken utkom som verk nr 1 i serien "Oriente-Okcidento".

Illustrerad av Sukhamoy Mitra.

Pris inbunden kr. 20: —. Den häftade upplagan slutsåld.

LA GRANDA AVENTURO kaj aliaj noveloj

Originalverk av dr F. Szilágyi. 144 sid.

De tolv novellerna och de två "groteska komedierna" är helt skrivna i författarens livliga och flytande stil, varierande mellan humor, sorg, satir och tragedi — som livet självt. Bland novellerna märkes en av Esperantolitteraturens pärlor: "Libera rabo".

Pris inbunden kr. 10: —, häftad kr. 7: 50

LA NORMANDAJ RAKONTOJ

19 noveller av Guy de Maupassant, översatta från franska av Roland Dupuis. 212 sid.

En av de värdefullaste böcker som utkommit på Esperanto: förnämligt innehåll, vackert bunden, vältryckt, utmärkt papper. De Maupassants mustiga berättarstil har av översättaren mästerligt överförts till Esperanto. Varje person i berättelserna blir för läsaren en god vän, som man med stort nöje träffar om och om igen vid varje ny läsning.

Rikt illustrerad av R. A. Pinchon.

Pris inbunden kr. 22:

ISLANDAJ PRAVOĈOJ

Tre berättelser och en dikt, översatta från isländska av Baldur Ragnarsson. 110 sid.

Ur den urgamla isländska sagolitteraturen har B. Ragnarsson valt tre sagor, som han återger med just den stil och stämning som man förbinder med Island. Dikten, den högtidliga och storvulna "Völuspa" i 57 verser, räknas som en av de mest storslagna i den isländska kulturen. Den tillhör Edda-poemen och stammar troligen från omkring år 1000.

Pris inbunden kr 10: —, häftad kr. 7: 50. .

TRA LANDOJ DE INDIANOJ

Reseskildring av Tibor Sekelj. Översatt från spanska av Ernesto Sonnenfeld. 186 sid.

Esperantovärldens store upptäcktsresande Tibor Sekelj berättar medryckande om en forskningsfärd till de tropiska djunglerna i Brasiliens inre och om sin långa vistelse hos indianstammar i Mato Grosso. Ytterst intressant och livfull skildring av ett liv långt bortom den civiliserade världen med problem, faror och glädjeämnen utanför vår vanliga sfär.

Pris inbunden kr. 30: —, häftad kr. 24: —

MI SERĈIS ORON

Äventyrsroman av David Flood, översatt från svenska av Karl Gustafsson. 132 sid.

Författaren berättar om sin arbetsfyllda ungdom i Värmland och om sin utvandring till Amerika efter den stora strejken 1909. Vi får följa honom under framgångsrikt oljeletande i Oklahoma och Texas i USA, vid äventyrligt guldsökande i Kanada och i intressant men farligt liv bland eskimåer och indianer längst upp i Nordamerika.

Pris inbunden kr. 10: —, häftad kr. 7: 50

VIVO VOKAS

Originalroman av Stellan Engholm. 180 sid.

En bok om ungdom i den skicklige stilistens enkla, klara stil på perfekt Esperanto. En bra bok som lätt bredvidläsning i första fortsättningskursen.

Pris inbunden kr. 10: —. Den häftade upplagan slutsåld.

PRINTEMPO DE MORTO

Roman av Lajos Zilahy, översatt från ungerska av L. Somlai. 120 sid.

En romantisk, spännande och lättläst kärleksroman, översatt till 18 språk, om en ung man, som har förälskat sig i två kvinnor . . .

Pris inbunden kr. 10: —, häftad kr. 7: 50

INTER SUDO KAJ NORDO

Originalnoveller av dr F. Szilágyi. 185 sidor.

De åtta berättelserna behandlar huvudsakligen människor, som bosatt sig i främmande land och deras känslor och upplevelser vid omställningen till helt nya förhållanden. Dr Szilágyi skildrar med träffsäkerhet men också medkänsla både svårigheter och glädjeämnen för invandrare i vårt för en främling kalla och mörka land.

Pris inbunden kr. 10: —

SIPESTRO RAKONTAS

Originalverk av F. T. Lundqvist. 72 sid.

Spännande och mycket intressant skildring av sjömanslivet ombord under de stora segelskeppens tid. Vi får lära väl känna den sympatiske författaren, först under de stränga utbildningsåren som skeppsgosse och sedan som sjöbefäl under farofyllda färder på de sju haven. Boken spänner över 50 år till sjöss och innefattar upplevelser bl. a. under båda världskrigen. En ovanlig och verkligt underhållande bok.

Pris inbunden kr. 10: —, häftad kr. 7: 50

BONA RIDO

Originalverk av A. Helm. 86 sid.

En samling "roliga historier" och skämtanekdoter med teckningar under mottot "Ett gott skratt förlänger livet". Originell och förströelsebra!

Pris häftad kr. 7: 50

SVEDA POEMARO

Ett 70-tal dikter ur den svenska litteraturen, översatta av Magda Carlsson. 112 sid.

Med enastående känsla för de olika diktarnas verk har Magda Carlsson överfört en mängd älskade psalmer, sånger, visor och dikter till Esperanto. Här finner vi bl. a. Wallins, Tegnér's och Runebergs patos, Lina Sandells rörande tro, Frödings burleska humor, Karlfeldts fantasi, Österlings lyrik, Siwerts och Ferlins dramatik och Nermans spiritualitet, på Esperanto lika tilldragande som i de svenska originalen.

Pris inbunden kr. 6: —

KREDO FLOROJ DINAMITO

Originalverk av Ernst Olsson, redigerad av Gösta Henriksson, 80 sid.

Tre biografier över tre stora svenskar: den heliga Birgitta, blomsterkungen Linné och uppfinnaren-industrimannen Nobel. Boken skrevs på Esperanto av den unge fysikern och läraren dr Ernst Olsson, som arbetade med ett större manuskript om svenska kulturpersoner, men som dog före dess fullbordan. En verkligt god presentbok till utlandsvännen!

Pris inbunden kr. 10: —, häftad kr. 7: 50

LA KONSCIENCO RĪPROĀS

Roman av August Strindberg, översatt av G. H. Backman. 60 sid.

Konflikter i människans liv, starkt och känslomättat tema mildrat av lyriska naturbeskrivningar.

Pris häftad kr. 2: —

PASKO

Drama i tre akter av August Strindberg, översatt av Stellan Engholm. 88 sidor.

Ett av Strindbergs mest kända verk — en högintressant bok.

Pris häftad kr. 2: —

På alla priser tillkommer lagstadgad moms. Alla ovanstående böcker lämpar sig utmärkt som kursläseböcker, gåvor till utlandsvännerna eller som presenter vid högtidsdagar.

Förlagets övriga utgåvor såsom läroböcker, ordböcker och grammatik finns på särskilt bokrekvizitionskort, som sändes på begäran.

LÄTT och BEKVÄMT

Skaffar vi allt som finns upp-
taget i UEA:s stora boklista
i årsboken, del II.

MEDDELA OSS DINA ÖNSKEMÅL!

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fack, 200 42 Malmö 7

Postgirokonton 578-5

Tradiciaj kredo kaj lingvo en Rumanio

de PROF. DR. ALEXANDRU CIUREA



Alba Iulia Katedralo.

Kiel sendito de la Rumana Ortodoksa Eklezio por la Rumana Paroĥio (2.000 membroj) en Svedlando mi sincere dankas al via redakcio, ke vi donas al mi okazon en via revuo konigi gravan historian periodon de niaj eklezio kaj popolo. Samtempe mi esprimas mian ardan deziron pli bone koni vian religian kaj popolan vivon. Mi estas konvinkita, ke nur reciproka kono povas generi rilatojn, sentojn kaj idealojn komunajn por sociaj kaj etnaj kolektivoj. Aliflanke ankaŭ pere de la eklezio oni povas atingi valorajn rezultojn en la proksimiĝo, amikeco kaj interfratiĝo de la popoloj, idealoj al kiuj pli kaj pli gravitas la nuntempa homaro.

Intence mi elektis malnovan periodon de nia historio, kiu estas malpli konata. Sed antaŭ ĉio mi devas mencii pli fruajn fazojn necesaj por kompreni la sekvajn.

Formiĝo de Rumanaj Landoj

La Rumanaj landoj naskiĝis en la 14-a jarcento: Muntenio en 1330, Moldovio en 1359. Transilvanio organizita komence laŭ formo de etaj rumanaj provincoj, dum la 11—12-a jarcentoj estis aligita al la Hungara reĝlando — kiel memstara princlando. Dum 1599—1600 realiĝas la unua unuiga provo de la tri rumanaj landoj sub Mihai Viteazul (Mikaelo la Brava). En 1859 okazis la unuiĝo de Moldovio kun Muntenio, sub la nomo Unuiĝintaj Princlandoj, kiu en 1862 transformiĝis en la unuecan ŝtaton **România** (Rumanio), nomo kiu ĝis hodiaŭ mont-ras ĝian latinan romanon devenon.

Sekve de la rusa-rumana-turka milito (1877—1878) Rumanio estis proklamita sendependa, kiun fakton rekonis la Paco de Berlino en 1878; en 1881 ĝi estis deklarita Reĝlando.

En decembro 1918, pere de la Kunveno en **Alba-Iulia**, Transilvanio decidis unuiĝi kun Rumanio; jene plenumiĝis la nacia unueco de la rumana popolo. Per la revolucia akto de la 30-a de decembro 1947 la monarkio estis nuligita kaj proklamiĝis la Rumana Popola Respubliko. La 21-an de aŭgusto 1965 naskiĝis la Socialista Respubliko Rumanio, la oficiala titolo, kiun havas ĝis hodiaŭ nia lando.

Nacieca konstisto de la rumania loĝantaro

En la Rumana Respubliko, krom la pli ol 19 milionoj da rumanoj, kunvivis ankaŭ aliaj naciecoj: hungaroj, germanoj, serboj, bulgaroj ktp. La rumanoj kune kun la aliaj naciecoj nombris en 1969 entute 20 milionojn da loĝantoj.

Konfesioj

Laŭ religia vidpunkto ekzistas ĉe ni pluraj konfesioj kristanaj kaj nekristanaj, al kiuj aldoniĝas tiuj, kiuj havas nenian religian kredon. Ĉiuj ĉi konfesioj vivas en la plej harmoniaj rilatoj kaj kunlaboras en la servo de la superaj interesoj de nia popolo kaj de la tuta homaro.

La ortodokseco estas la plej grandnombra religio ĉe ni t. e. 15—16 milionoj, do pli ol 75 %. Poste sekvas ĉirkaŭ unu miliono da katolikoj kaj 700—800 mil protestantoj.

En la jaro 1925 la Rumana Ortodoksa Eklezio estis altigita je la plej alta grado de Patriarkeco. La nuna Patriarko estas Lia Sankteca Moŝto Justinian.

La etna formiĝo kaj kristaniĝo de la rumana popolo

La etna genezo de nia popolo daŭris longe: de la 2-a ĝis la 7-a jarcento, kiam ĝi aperis sub la nomo "v a l a h i" (valakoj) aŭ "v l a h i" (vlakoj), nomoj donitaj de la ĝermanaj popoloj, kiuj transpasis poste al la slavoĵ kaj en la bizantinajn kronikojn. La ĝermana nomo "W ä l s c h", kune kun la franca "V a l l o n" (Valonoj), samkiel "Valak" aŭ "Vlak" estas sinonimoj kaj havas la signifon de r o m a n o, popolo r o m a n a.

Nia etna formiĝo komenciĝas en la jaro 106, samtempe kun la konkero de Dakio pere de armeo de imperiestro Trajano (98—117) kaj la koloniigo de ĉi tiu provinco per elementoj de la roma imperio, post obstinaj bataloj kontraŭ la dakoĵ kaj venko super ili. (Detaloj pri la Daka epoko aperis pli frue sur la kolonoj de "La Espero" Rim. de la trad.)

Kristanigo (Rolo de g o t o)

La kristanigo ĉe ni komenciĝas en la komenco de la 2-a jarcento dank' al la klopodoj de anonimaj misiistoj venintaj el la kristanaj komunumoj fonditaj de apostoloj kaj iliaj adeptoj en la proksima kristana Oriento aŭ el Grekio.

Komence t. e. dum la 2-a kaj 3-a jarcentoj oni disvastigis la Evangelion in-

termite kaj sporade. En la 4-a jarcento ĝi disvastiĝis ĉe la plimulto de la romanaj popoloj je la Nordo de la Danubo. Ĉe la 1-a Ekumena Sinodo de Niceo en 325 aperis episkopo de ĉi tiuj provincoj "Theophilus Gothia e", ĉar tiam la pli fua Dakio troviĝis sub la regado de la Gotoj, kunfederacioj de la roma imperio.

Ni povas konkludi, ke la enkonduko de la kristanismo ĉe la rumanoj, samkiel ilia etno-genezo estis verko de pluraj jarcentoj (2—7-a) kaj ke oni disvastigis ĝin laŭ la malrapida vojo de la persvado de animo al animo.

La origino de la rumana kristaneco estas certe orienta.

Ĝis hodiaŭ ni estas la sola popolo de romana deveno, sed kun ortodoksa kredo.

Jenan fakton eksplikas i. a. ĝia geografia situo inter la pli fruaj regnoj kaj kulturoj: romana kaj greka, t. e. interkruciĝo de Oriento kun Okcidento. Ni substrekas, ke fine de la 3-a jarcento kaj komence de la 4-a, precipe dum la persekutado de Diokleciano (285-304) amaso da individuoj el ĉiuj sociaj kategorioj, el ĉi tiu "orienta romaneco", sigelis per martireco sian kristanan konvinkon.

La problemo de la rumana lingvo kaj ĝia uzado en la religia kulto

De niaj dakaj praŭloj restis al ni proksimume nur cento da vortoj, kio pruvas la kompletan venkon de la popola lingvo latina, kiu post jarcenta uzado tie ĉi rezultis en la apero de nova lingvo, inter la novromanaj lingvoj, la lingvo rumana. La ĉefa bazo leksika, la topiko de la frazo, samkiel la gramatiko de la rumana lingvo estas latinaj. Oni konstatis dum filologiaj kongresoj, ke multaj esprimoj de latina deveno pli bone konserviĝis en la rumana lingvo ol en la aliaj romanaj lingvoj (franca, itala, hispana ktp.).

Laŭ malnova statistiko (Kopitar) la vortbazo de la rumana lingvo havas jenan devenon: 60 % de la vortoj, t. e. 3/5, estas de latina deveno; 20 % t. e. 1/5, estas de slava deveno, kaj 20 % do la lasta kvinono, de diversaj devenoj (greka, turka, franca, germana ktp.). La germanan influon mi ekzempligas per sola esprimo "Ziegel" (teĝolo), kiu en la rumana lingvo estas "tiglia". Sekve la ĉefa vortbazo de la rumana lingvo estas de latina deveno. La slava influo rezultas el nia longa periodo simbioza (7—10-a jarcentoj) kun la slavaj popoloj.

Depost la jaro 271 ĝis 1241 pasis super la rumanoj: gotoj, hunoj, gepidoj, avarioj, slavo, kumanoj kaj tataroj. Tiun ĉi malluman periodon de nia popolo tralumas la fakto, ke ĝi tamen konservis siajn lingvon, kredon kaj prateron, aliroĉante sin al la Karpata montaro, kvazaŭ al nia viv-vertebraro.

Laŭ ĉiuj historiaj esploroj ĝis nun oni kredas, ke ni uzis kiel liturgian lingvon en la eklezio la latinan lingvon ĝis la 10-a jarcento, kiam, dank'al specialaj cirkonstancoj historiaj oni enkondukis en la Eklezion kaj en la Kortegan kancelaron la slavan lingvon.

Ek de la 15—16-a jarcento, dank'al la arda premo de la popola deziro, kiu ne komprenis la slavan lingvon, kaj iugrade sub la influo de la protestantaj ideoj reformistaj, oni tradukis la unuajn bibliajn tekstojn en la rumanan lingvon. Tiu ĉi iom post iom penetris en la publikan kulton, kiu en la 17-a jarcento atingis preskaŭ plenan rumanigon.

La enkonduko de la rumana lingvo en la Rumanan Eklezion dum tempo kiam nur certaj lingvoj estis deklaritaj liturgiaj sanktaj, estis epoka kaj revolucia akto de la Ortodoksa Eklezio Rumana, kiu rezultigis du gravajn efikojn:

1. La kontakto kun la vorto de Dio kaj la kultivado de la pieco en la nacia lingvo kondukis al substanca kresko de la spirita vivo de nia popolo.

2. Ĝi donis al nia popolo tre unuecan lingvon, kiun ĝi havas ĝis hodiaŭ. La rumana lingvo apartenas al la multaj lingvoj kiuj ne havas dialektojn. Tio ĉi dank' al la Eklezio kaj ĝiaj klerikuloj.

Pruva valoro de la filologia argumento


La kompetenta esplorado de la eklezia lingvo, pli ekzakte de la terminoj de kredo, kulto kaj eklezia administrado ne nur konfirmis la konkludojn kiuj rezultigis el la historiaj kaj arkeologiaj enketoj, riate la malnovecon de la kristanismo, sed ĝi alportis serion da novaj kaj valoraj kontribuoj, precizigante eĉ pli amplekse la devenon de nia kristanismo.

La esprimoj pri uzataj religiaj nocioj, speciale ilia semantiko, pruvas, ke en la rumana lingvo ni havas kvar specojn da terminoj:

1. Grekaj terminoj: "har" difavoro, graco, "patima" = sufero, "iconana" = ikono, "evanghelie" = evangelio, "inger" = angelo, ktp.

2. Latinaj terminoj, kiuj tamen enhavas nociojn pri orienta kristanismo (ekz. la imperio de Dio "kontraste al "regnum Dei", okcidenta ideo ĝeneraligita; caseum + ligare = ĉis-legi — tipe rumana vorto kun orienta senco.

3. Tipaj kreaĵoj de la rumana popolo en la latina lingvo (ekzemple la vorto "Biserica" (Eklezio, preĝejo) havas nenion komunan kun la okcidentaj sinonimoj latinaj (Eglise, Chiesa, Church, Iglesia ktp.) kiuj ĝenerale devenas el Ecclesia-Ecclesia, nek kun la slavona "tarcva". Ĝi estas unika



Sucevita Monakinejo.

kreaĵo de nia popolo el la 2—4-a jarcento, dank'al la orienta misiado ĉe la latinlingva popolo ĉi-loke.

4. La slavaj terminoj estas de malfrua dato. Plej frue post la 7-a, pli precize post la 9-a jarcento.

Al tio ĉi aldoniĝas la fakto, ke niaj terminoj, kvankam de latina origino, estas tute diferencaj de tiuj de la romkatolika eklezio dum la 2—4-a jarcento, kiujn ni bone konas. Jene ni alvenas al la konkludo, ke koncerne la religian kredon, **ni havis nenium rilaton kun la Papa Romo**, kiu estus klopodinta unuigi nin kun si, en la eklezia lingvo.



Kruco en Oltenio.

Dum la alveno de la slavoĵ kaj poste de la bulgaroĵ, la rumanoĵ jam delonge estis kristanigitaj. La slavoĵ kaj bulgaroĵ ricevis la unuajn kristanajn ideojn de la romanidoĵ kristanigitaj ĉe la Danubo. Tion pruvas la vorto "Craciun" = Kristnasko. Ĝi estas tipe romanida kreaĵo, tute diferenca de "Noel" de la francoĵ kaj de "Natale" de la italoĵ, sed kiun espriron alproprigiis tiel la bulgaroĵ, kiel la rusoj kaj hungaroĵ. Eĉ la vorto "tar" = caro en la slavaj lingvoĵ ŝajnas deveni el la latina "Caesar" kaj ŝajne prenita de la samaj romanidoĵ.

La Rumana Ortodoksa Eklezio ne estas slava eklezio

Ĝi havas sian propran lingvon en la kulto, tradicio kaj individueco.

Estas vere, ke la rumanoĵ ricevis de la slavoĵ la riton bizantin-slavan en la 10-a jarcento kune kun la malnov-slava lingvo liturgia. Sed ĝin anstataŭis ek de la 16-a jarcento la nacia lingvo de la rumana popolo. Ankaŭ tiu ĉi estas grava karaktero kompare al la slavaj eklezioĵ, kiuj ĝis hodiaŭ uzas la malnov-slavan lingvon en la eklezio.

KARIN

de ION ARCAS

Karin absurda sopiro al lontano, la nuboj signis mian foriron al ludado karesema.

La senvida monat'septembro forgesinte ĉiam grizajn kutimojn ĉizelis ŝian knabinan figuron, la vagonaroĵ preteriras nin petoleme supre-sube malkviete kaj senĉese kiel ĝemeloĵ en prizorgo sorĉodira Karin absurda sopiro al lontano.

El la rumana
Eugenia Morariu

Ĉi poemo esprimas sudan sopiron al Nordo. Lontano = malproksimeco.

LA VERDA LUMTURO

Eldona Soc. Esperanto

Fack, 200 42 Malmö 7

montras la vojon al la

LITERATURA REGNO DE ESPERANTO

Finvortoj

Fine ni devus mencii kelkajn rimarkindajn kontribuojn kaj paroli pri pli gravaj personecoĵ de nia malnova kristanismo.

Unuvice paroli pri la "skitaj monaĵoĵ" el Scitia Minor, t.e. la provinco inter la Danubo kaj Nigra Maro: Ioan Maxentiu, Leontiu el Bizanto, kaj aliaj. Pri Ioan Casian, kiu devenis en rumana provinco Dobrogea, samkiel la pli frue menciitaj. Pri Dionisie Exiguul, episkopo Auentiu de Durostorum, pri Niceta de Remesiana. Sed ni, bedaŭrinde, ne povas doni ampleksajn detalojn por ne misuzi la gastamajn kolonojn de via revuo.

Tamen ni ne povas forgesi apreze menzi Ulfilas la grandan apostolon — kristaniganto de la gotoĵ dum la 4-a jarcento, tradukanto de la Biblio en la gotan lingvon, kiu en sia traduko uzis multnombran terminaron de la rumana loĝantaro, en kies sino vivis ankaŭ la praŭloĵ de nia popolo. Lia fama Arĝenta Biblio "Codex Argenteus" ja troviĝas en via malnova universitata urbo Uppsala.

Trad. el la rumana de
Tiberio Morariu

RECENZOJ

William Shakespeare:

LA TEMPESTO

Tradukis K. Kalocsay. Prezo ĉe Eldona Soc. Esperanto, Malmö, sv. krj 15: — kun imposto.

Unue decas konfesi, ke mi neniam legis la dramon **La Tempesto** ĝis la traduko en Esperanto venis en miajn manojn. Mi ne povas kompari al la originalo aŭ al la sveda versio.

Tiel mi tamen konas la stilon de Shakespeare, ke mi plene ĝuas retrovi ĝin majstre prezentita de Kalocsay en **La Tempesto** same kiel jam en **Reĝo Lear** kaj **Somermeznokta Sonoĝo**. Tute certe ne estis facila venko super amaso de malfacilaĵoĵ lingvaj kaj stilaĵ, kaj oni bone komprenas ke Kalocsay alte taksas la helpon speciale de R. Rosetti, "kiu ankaŭ nun, kiel ĉe mia **Lear-traduko**, ne domagiis la penon de ĝisfunda tekstokomparado kaj sarkado de ĉio nekonsvena el ajna vidpunkto." Sed ankaŭ al kelkaj aliaj eminentaj kapabluloĵ Kalocsay esprimas dankon en la Postparolo. Ĉar mi povas nenion alian fari ol senrezerve gratuli la esperantistaron pro la nun donita ebleco aliri ankoraŭ verkon de Shakespeare, mi volas vere kapti la okazon atentigi pri la valoro de bonaj kaj kompetentaj helpantoĵ aŭ konsilistoj. Laŭ mia kompreno, pro la tri Shakespeare-interpretoĵ la signifo de Kalocsay por nia literaturo kaj lingvo fariĝis eĉ pli granda ol antaŭe, ĉar ili montras kiaj rezultatoĵ estas atingeblaj en Esperantuĵo per kunlaboro sur plej alta nivelo. Grava revizio, do, de la antaŭopinio kiun mi sentis antaŭ la legado de **Lear**; ĉu hungaro, kiel ajn eminenta pri diversaj lingvoĵ, povas ĝuste interpreti Shakespeare-on.

Aliaj prijuĝantoĵ jam skribis pri lingvaj licencoj uzitaj en **La Tempesto**, ekzemple pri la ofta elizio de la komencliterno de la verbo **esti** kun fleksioĵ. Mi nur faru la rimarkon ke Kalocsay en la Postparolo donas la bazon, kaj referencas i. a. al **Parnasa Gvidlibro 2a** eldono. Tamen, li donas ankoraŭ komentojn en la Postparolo, el kiuj mi trovas speciale menciinda la jenan: "Se oni prezentos la dramon antaŭ publiko, kies lingvoscio promesiĝas primitiva lerta regisoro povos porokaze plisimpligi ties lesikonon **ad usum Delphini**. Sed al esperanta literaturo en sia tuto ne povas esti farata **ad usum Delphini**." (La latina esprimo signifas proksimume: por la uzo de nematurulo.)

En la jam plurfoje aludita **Postparolo**, kie ni cetere trovas multajn interesajn komentojn kaj informojn pri kaj ĉirkaŭ **La Tempesto** kaj aliaj dramoj de Shakespeare, Kalocsay

preskaŭ parenteze sed kun sentebla doloro anoncas ke **La Tempesto** estas "probablege" lia lasta traduko el Shakespeare. Korŝire oni devas ja konstati, ke li fakte havas pli da jaroj ol la homoj kutime estas donataj, kaj ni permesu al li sin laŭplaĉe dediĉi al pli simplaj ekzercoj.

Sed ni aliaj zorgu, urĝe, ke la eldonombro de valoraj verkoj en Esperanto pligrandiĝu. **La Tempesto:** 1000 ekz. Skandalo!

Ake Ahlén

P. Korte:

SUB LA VERDA STANDARO

Dansk Esperanto-Forlag. Prezo ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö. 7: — sv. krj.

Certe multaj el vi jam delonge konas tiun ĉi lernolibron de Esperanto, kiu aperis nun jam en 7a eldono.

Laŭ la vortoj de la aŭtoro, en la antaŭparolo al la eldono en 1947, la lernolibro estas verkita laŭ propraj spertoj akiritaj en la instruado de la infanoj en popollernejo.

Ĝi estas rektmetoda instrulibro. La verkinto taksas tiun ĉi metodon pli taŭga ol aliaj — precipe en instruado al infanoj — ĝuste pro ĝia facileco kaj ebleco vekti pli da intereso ĉe la infanoj. Unu el ĝiaj plej gravaj avantaĝoj ankaŭ estas ĝia internacieco (manko de nacilingvaj tradukoj) kaj ebleco eduki infanojn laŭ sama maniero, tiel, ke ili post la finiĝo de la kurso pretas ekkorespondi, estante sur sama nivelo.

Mi mem kiel infano lernis laŭ tiu ĉi lernolibro. Kaj mi povas nur rekomendi ĝin. La lernolibro estas skribita en freŝa stilo, teksto estas klare superrigardebla. La lecionoj estas mallongaj kaj pro tio ne laciigas la lernantojn. La vortprovizo estas tre bone elektita — la infanoj renkontas tie objektojn al ili proksimaj, intime konataj de la ĉiutaga uzo en la lernejo kaj en la hejmo. Oni eble nur povus deziri iom pli da spaco por la kompletigoj en la teksto mem.

Fine de la lernolibro troviĝas laŭalfabeta vortareto de la vortoj lernitaj.

Ni nur povas kun ĝojo atendi, ke post la Laborilo I laŭ la promeso baldaŭ aperos Laborilo II (kiu kostos 9 dkr) kaj la Gvidilo por instruis-toj (10 dkr).

I. A.

LIBROJ RICEVITAJ

LA GENERALA INSTRUADO EN V. D. R. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo 1971. 142 p.

RESUMO PRI VJETNAMIO. Fremdlingva Eldonejo. Hanojo 1971. 132 p.

LA HORLOGISTO DE DJEN BJEN FU (Elektitaj vjetnamaj noveloj de la periodo 1945-1964). Fremdlingva Eldonejo. Hanojo 1971. 416 p.

ERIK LINDORM:

Minuto de felico

*Cu ver', ke infanon mi premas al kor',
min mem rekonas en ĝi,
ke ter' estas varma, fajreras marfor',
ĉielo serenatas sen stri'?*

Kiu tempo nun estas? Kaj kiu la jar'?
Kiu estas mi mem, mia nom'?
*Vi ridanta vindajo kun blonda harar',
kiel venis al mia brakum'?*

Mi vivas! Mi vivas! La ter'je dispon'!
De kie min portis la vent'?
Mi eble atendis dum jarmilion'
por tiu ĉi sola moment'.

El la sveda: Magda Carlsson-Bohman

LA FINN-SVEDAJ TAGOJ LA 28—29 DE OKTOBRO 1972

Kiam la kluboj en Turku kaj Stokholmo por la dua fojo aranĝis komunan programon dum unu semajnfino partoprenis sufiĉe multaj gesamideanoj.

Forlasinte Skeppsbron je la 18.30 vendrede la 27-an de oktobro la ŝipo Bore kunportis 21 gajajn samideanojn, plejparte el Stockholm.

La vespero estis bela, kaj tute trankvila, kvieti la maro kaj oni eĉ ne povis imagi ke la granda, luksa konstruaĵo estas movanta ŝipo. Tuj ni kolektiĝis ĉirkaŭ tabloj por ni rezervitaj en la manĝosalono kaj ĝuis la centspecajn manĝaĵojn. Poste ni pasigis la vesperajn horojn en apuda salono babilante, trinkante kafon.

Je la alveno al Turku nin atendis Jorma Ahomäki kaj kelkaj aliaj klubanoj kun aŭtobuso kaj gvidis nin en rondvojaĝo, dum kiu ni ne nur deekstere vidis la urbajn vidindaĵojn sed ankaŭ vizitis kelkajn el ili. Unue la aĝan katedralon, kie ni ĝuis belan muzikon per la granda orgeno kiun ludis la organisto Pauli Riihivaara. Li ankaŭ rakontis pri la longdaŭra konstruado kaj kelkfoja rekonstruado de la bela katedralo. Poste ni daŭrigis la aŭtobusan vojaĝon al la muzeoj de Sibelius kaj Wäinö Aaltonen.

Niaj finnaj amikoj sukcesis enmeti multajn vere ĝuidajn altvalorajn kulturajn erojn en la programo dum nur unu mallonga antaŭtagmezo — sed por kontentigi ankaŭ niajn pli materiajn dezirojn ili aranĝis viziton al tute nova, granda vendohalo por memservado, City Market.

ANEKDOTOJ DE VOJAĜO aŭ PREZIDENTO HO CHI MINH RAKONTAS de T. Lan. VPEA-Eldonejo, Hanojo 1971. 96 p.
ESPERANTA LEGOLIBRO de Elio Migliorini, 256 p., kvina eldono, Itala Instituto de Esperanto.

Tie ni perdiĝis en la serĉado pri finnlandaj specialaĵoj kaj nia kara Jorma per vera nervostreĉo enkalkulis la lastajn de siaj perditaj ŝafoj antaŭ la ekvojaĝo al la lunĉrestoracio "Cafenoir". Post la manĝo ni kolektiĝis en la Urba biblioteko. Belega, malnova domo je la rivero Aura, posedanta ne malpli ol duonan milionon da libroj, en moderne aranĝitaj studsalonoj.

Ankaŭ tie ni aŭskultis muzikon kaj aŭdis bibliotekistinon Sirkka Salmivaara en la esperanta lingvo rakonti pri la biblioteko.

Poste ni vizitis la belan modernan ejon de la klubo. Tie atendis denove agrabla miksaĵo de kulturaj kaj materiaj travivaĵoj.

Kiam fine estis tempo forlasi la amikan rondon sekvis nin ne malpli ol 39 finnaj gesamideanoj al Stockholm por pasigi la dimanĉon tie.

Alvenante Värtahamnen dimanĉmatene renkontis stokholmaj klubanoj. Sekvis por la finnoj aŭtobusa rondvojaĝo en la urbo kaj lunĉo en la restoracio Bill och Bull. Posttagmeze mallonga vizito al la nova Parla-mentejo, iom da aĉetado en Åhléns kaj fine vizito al la kluba ejo Jungfrugatan 30, kie ni malgraŭ limigita spaco sukcesis trinki kafon, kanti kaj pasigi la vesperajn horojn. Maud Pelz kaj Roland Dupuis per kantado kontribuis al nia plezuro.

Je nia granda surprizo kaj ĝojo niaj gastoj transdonis belan vazon el "Arabia" kiel donacon al la klubo. Ĝi ĉiam havos honoran lokon en nia ejo!

Kiam ni vespere je la haveno disiĝis de novaj kaj malnovaj geamikoj post du aktivaj, laciĝaj, sed amuzaj kaj agrablaj tagnoktoj ni certe ĉiuj havis la deziron ripeti la realigon de ĉi tiu bona ideo.

Ni dankas la finnojn pro ilia vere modela arango kaj por ilia multnombra partopreno kaj diras: Ĝis revido en Turku kaj Stockholm!


Solveig Edvardsson

NI GRATULAS



HENNING HALLDOR 80

Bedaŭrinde mankis en nia antaŭa numero la informo, ke Henning Halldor fariĝis 80-jara la 18-an de septembro. Tio estas malfacile pardonebla malatento, ĉar li estis iam redaktoro de *La Espero* (1921—1927) kaj ankaŭ sekretario de SEF. Li estas ankaŭ iniciantinto de Eldona Societo Esperanto kiun li gvidis dum multaj jaroj. Ni postfeste kore gratulas!



KARL SÖDERBERG 70

Estas nekredinde, ke tiel laborema kaj konstante okupita persono la 6-an de januaro 1973 estos 70-jara. Tion oni ne rimarkas. Li estis instruisto en preskaŭ ĉiuspecaj instrumedioj kaj fine fariĝis lerneja direktoro en Uppsala. Dank' al prelego de H. Seppik Söderberg fariĝis Esperantisto en 1929. Multon la simpatia samideano faris kaj daŭre faras por la E-movado. Kunhelpis la klubon en Uppsala, verkis plurajn artikolojn, faris informajn prelegojn pri E ktp. Lia plej granda agado estis en la kadro de Sveda Esperanto-Instituto, kie li de 1934 estis direktorano. Kiam la sveda radio permesis programojn en kaj pri E Söderberg anoncis sian valoran kaj ŝatatan helpon kaj gvidis la programojn. Frue li fariĝis membro de la Komitato de

UEA kaj la Akademio de Esperanto. Dum jardekoj la sveda registaro elektis lin esti ĝia oficiala reprezentanto ĉe la Universalaj Kongresoj. Al Karl Söderberg, Uppsala, en kiu urbo li ĉiel partoprenas la komunuman vivon, la E-movado transdonas sian plej korean gratulon.

Jan Strönne



SUNE AHLM 60

Antaŭ kelkaj jaroj Sune Ahlm translokiĝis de Stockholm al Vargön. Tio signifis, ke li por kelka tempo malaperis pli aŭ malpli el la esperantistaj rondoĵoj. Dum lia aktiva tempo li tamen sukcesis sufiĉe multon fari por esperanto: fondi la esperantoklubon La Aglo en Karlskoga kun iuj kamaradoj, esti sekretario de SEF kaj dum dek du jaroj ĉefo de Eldona Societo Esperanto.

Kiam antaŭ tri jaroj la redakcio de *La Espero* estis lokigata apud lago Vänern estis tute nature peti Sune Ahlm fariĝi teĥnika redaktoro, kaj feliĉe li sen hezito akceptis.

Jam pli frue mi konis Sune Ahlm kiel la sorĉiston, kiu amuzigis eĉ kongresanojn per siaj artifikoj, sed la veran sorĉiston mi ekkonis nur dum la lastaj jaroj. Elegante kaj lerte li kreas belan revuon el la senesperiga miksaĵo da kompostita teksto (se tiu ĉi artikolo estas iom strange enmetita ne kulpigu lin; ĝin li ne vidis). Tiu laboro ĝenerale estas farata en lia hejmo, dum mi rigardas kaj li kreas. Sed tiuj laborhoroj en lia ĉarma hejmo estas agrablaj travivaĵoj ankaŭ en alia senco, ĉar Sune havas vastajn interesojn kaj li ĉiam scias ion novan montri aŭ rakonti.

La 28-an de decembro li estos 60. Ni gratulas kaj esperas, ke li aktivos dum ankoraŭ kvar jardekoj!

Ake Blomberg

JUBILEO JUNG

Niajn tutkoraĵajn gratulojn al s-ro **Teo Jung**, kiu la 21.12.72 iĝos 80-jara.

Li fondis "*Esperanto Triumfonta*" la 14.4.1920 en Horrem bei Köln (Germ.), aperigante sendependan Zamenhof-stilan, altnivelan gazeton (la patron de *Heroldo de Esperanto*) laŭ horloĝa ekzakteco, dum rekorda re-



Teo Jung

daktado de kvar jardekoj. La 16.1.62 li transdonis la eldonon k. redakton en pli junajn manojn de s-rino **Ada Fighiera-Sikorska**, kiu lerte-sperte gvidis nian Heroldon al la Ora Jubileo de 50 jaroj en 1970.

La mekanismon de nia verd-herolda horloĝo detruis la hitlera barbarismo en 1936 kiam Geŝtapo fermis la eldonejon k. presejon en Kolonjo. Teo Jung sukcesis eskapi al Nederlando (sen mebloj k. preseja instalaĵo) kaj post multaj klopodoj ripari k. refari tie la Heroldan horloĝon.

La unua Esp-a legaĵo de l'subskribinta novbakita verdstelano estis nekrologo pri Antoni Grabowski en julia n-ro 1921 de *Esp. Triumf.* kaj dum 50 jaroj mi restis fidela leganto de la brila gazeto ET-HE.

T. J. eldonis beletraĵajn originalojn, i. a. "Landoj de Fantazio", *La Alta Kanto de l'Amo*", Preĝon: "Ho, donu al mi vastan koron". T. J. estis kuntradukanto de "En Okcidento nenio nova" de Remarque". Li eldonis ankaŭ lingvajn verkojn, ekz. "La Kunmetitaj Verboformoj — Pri la Absurda Ata-Ita — problemoj", "La Esp-a Konjugacio" kun pli ol 1 000 ekzemploj plejparte Zamenhofaj. Ni ne povas menci ĉiujn liajn eldonaĵojn, sed nepre volas memori pri la "Taglibro de Anne Frank".

Malgraŭ du gravaj operacioj (1961 k. 1965) li ĝuas kontentigan sanstaton. Lia edzino k. dumviva kunlaborantino eĉ nuntempe devas admoni sian edzon, ke li ne tiel ofte vizitu la eldonejan kontoron. Por atingi ĝin, li devas grimpi 50 ŝtupojn... Per aspera ad astra! Bonsanan daŭrigon!

Fine ni citu etan eron el "*Rimporretoj*" de poeta majstro **Kalocsay**:

Jen Teo Jung — la Fluga Famo
Heroldo de plej freŝa nov!
Por ni laŭ lia mana mov'
Turniĝas monda panoramo.

Li ludas sur plej vasta gamo
Per rotaci-maŝina pov',
Jen Teo Jung — la Fluga Famo,
Heroldo de plej freŝa Nov'...

T. M.

LA KRUCVORTENIGMO

en nro 2/1972 evidente estis malfacila; alvenis du solvoj, ambaŭ malĝustaj. La plej bona el la du havas du erarojn, kaj ni tamen sendas al la kuraĝa solvinto Eric Castell, Gässemåla, Ryd, unu libreton rekompence.

Ĉe la redakcio jam troviĝas alia krucvortenigmo, pli facila. Ĝi aperos tuj kiam ni trovos lokon por ĝi.

NOVA KLUBO

fondiĝis en Charlottenberg. Ĝi nomiĝas "Paclimo" kaj havas je la komenĉo 17 anojn. Ĝi estas la rezulto de esperantokursoj dum du vintroj. Ni gratulas al la nova klubo kaj deziras al ĝi bonan progreson. Adreso: Hans Lindqvist, Lärkvägen 10, 670 50 Charlottenberg.

DEZIRAS KORESPONDI

Instruisto de naĝado en sovetia banloko Jalta deziras korespondi. Kolektas ilustraĵojn pri Gotenburgo, Malmö, Haparanda kaj Trelleborg. M. Cimberov, Kirova 10—1, Jalta, 334200 Krim, Sovetunio.

17—19 jaraj studentinoj de pedagogia lernejo deziras kontaktojn kun samaĝuloj en Svedujo. Skribu al Esperanto-klubo, Jalta, 334200 Krim, Sovetunio.

Hristo Dolčinkov, Str. D. Juanov 7, V. Tirnovo, Bulgario, serĉas korespondantojn por siaj gekursanoj, 24—40 jaraj, plejparte instruistoj.

EL POPOLA ĈINIO

Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO: 1 jaro £ 0.50 Can.\$ 2.00 Sv. Krj. 7:—
2 jaroj £ 0.75 Can.\$ 3.00 Sv. Krj. 10: 50
3 jaroj £ 1.00 Can.\$ 4.00 Sv. Krj. 14:—

ABONU: Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj
aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Ĉiu abonanto por la jaro 1973, kiu faros
abonon antaŭ la 31-a de la venonta januaro,
ricevos belan esperantan bild-kalendaron.

Sveda peranto:
Esperantoförlaget
Fack
200 42 MALMÖ 7
Postgiro 578-5



Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

58-a
UNIVERSALA KONGRESO
de Esperanto



28 juli—4 augusti 1973

BELGRAD, JUGOSLAVIEN

blir platsen för esperantovärldskongressen 1973. Anmäl Eder redan nu till kongressen. Svensk förmedlare (Peranto) av kongressanmälningar är som vanligt endast Svenska Esperanto-Förbundet.

Anmälningblanketter erhålles efter rekvisition hos s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö (tel. 040/652 09).

Anmälan. Anmälningblanketter och sedermera även beställningar av logi och utfärder skall insändas till samma adress, s-ino Andrén, Malmö, och icke till Holland eller Jugoslavien.

Likvid. Avgifterna insättes på postgirokonto 14 74 29-5. Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö.

KONGRESSAVGIFTER

(Obs! Svenska kronor)

	Till 31/12 1972	Till 31/3 1973	Till 20/6 1973
1. Kongresano, ne membro individua de UEA	136:—	150:—	163:—
2. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun jarlibro (MJ)	114:—	127:—	141:—
3. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA)	91:—	105:—	118:—
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1	96:—	106:—	115:—
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorioj 2 aŭ 3	80:—	88:—	96:—
6. Junul(in)o ĝis inkl. 20-jara	42:—	46:—	50:—
7. Universitata student(in)o ĝis inkl. 30-jara	69:—	76:—	82:—
8. Blindul(in)o	55:—	61:—	66:—

Var vänlig skriv namn etc. tydligt på anmälningblanketten men ej några avgifter (det gör SEF). Meddela i stället avgifterna tydligt på postgirotalongen eller helst i särskilt brev tillsammans med anmälningblanketten.

Rabatt får som synes direkta medlemmar i UEA. Det lönar sig alltså att bli direkt medlem. Ni vinner många fördelar. Gör allvar av att anmäla Er som direkt medlem av UEA.

Gåvor: Som vanligt mottager SEF och vidarebefordrar gåvor till Litteraturfonden (tävlingspremier), Blindfonden (de blindas kongress), Adopta Kaso (för dem som ej får betala från eget land) och Adoptaj Ge-patroj (för barnkongressen). Givares namn publiceras. Svenskarna bör observera dessa fonder, även om Ni själva ej skall resa till kongressen.

Lämna gärna Ert bidrag.

SEF

La Espero

Svenska Esperanto-Tidningen

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Adreso: Krokvägen 85, 122 32 Enskede.

Cefredaktoro: Ake Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping. Tel. 0510/235 26 (laborejo 0510/221 30).

Literatura redaktoro: Tiberio Morariu.

Teknika redaktoro: Sune W. Ahlm.

Prezo de jarabono: 20 sv. kr. (postēeka konto 20 12-3).

Prezo de anoncoj: 1/1 paĝo 180:—, 1/2 = 90:—, 1/3 = 60:—, 1/6 = 30:—, 1/12 = 15:—.

Millimetra prezo 40 öre.

Korespondanonco: 25-vorta = 4:—, 50-vorta = 8:—.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

SVEDA ESPERANTO - FEDERACIO

Adreso: Jungfrugatan 30, 3 tr.
114 44 Stockholm



Girkonto: 20 12-3

Telefono: 08/62 58 76

Dejortempo: Merkrede 18—20a horo

Kotizoj por Rektaj membroj: 25 kr., junuloj 7 kr.
familia membro sen gazeto 5 kr.

ESTRARO

Prezidanto: Jan Ströme, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.
Tel. 040/12 92 11.

Vicprezidanto: Ragnar Hjorth, Kronobergsgatan 25, 4 tr 8. g.,
112 33 Stockholm. Tel. 08/52 76 67.

Sekretario: Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Kasisto: Sven Alexandersson, Krokvägen 85,
122 32 Enskede. Tel. 08/49 80 24.

Bertil Akerberg, Lillsvägen 39, 126 57 Hägersten.
Tel. 08/46 29 95.

Artur Malmkvist, Asögatan 182, 116 32 Stockholm.
Tel. 08/41 78 74.

Franco Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Tomas Jansson, Sturegatan 12 B, 752 23 Uppsala.
Tel. 018/11 73 09.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42, Malmö 7

Ejo: Möllevångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:
merkrede 10.00—11.00 jaŭde 17.00—18.00

Skrabaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Poŝtgiro 578-5.

★

Administranto: Anna-Greta Ströme

Tel. hejma 040/12 92 11

Prez. Sven Sjöblom